Jam anonciĝis (alfabete): Bert Boon pri ENA, Frans Croon pri Terkultivata blankigita cikorio, Marc Cuffez pri ILEI, Martin Decaluwe pri Gogol, Marcel Delforge pri la origino de la nomo “Baraque Michel”, Jo Haazen pri Fakaj asocioj – kien.

Kiel alternativo vi povos kuniri en la urbon, gvidata de profesia urba gvidisto, kiu montros kelkajn nekonatajn angulojn de la urbo, kun komentoj en Esperanto. Samtempe vi ricevos demandoliston kaj fotojn, kiuj igos ĉi urboviziton samtempe serĉpromeno! E nla mezo de ĉi tiu numero vi trovos jam fotan impreson pri ĉi tiu vizito.

Ĉirkaŭ la kvina kaj duono ni transiros al la restoracio apuda, kie vespermanĝo (kun sufiĉa elekto kaj demokrataj prezoj) nin atendos. Por tio vi ekde nun povas aliĝi, sed prefere antaŭ la 10-a de februaro. Kelkaj malfruuloj povos aldoniĝi en la tago mem, sed ni tamen provas havi bonan ideon pri la nombro de manĝontoj. Ĉu vi do sciigos vian venon? Ankaŭ ĉe iesperanto3000.be/demandaro/sia.html (aŭ Karekietenlaan 14, 3010 Kessel-Lo, aŭ 0486/392802). Kaj tiel ni finos ĉi tiun agrablan tagon. Ne maltrafinda do!

Nepre notu tiun daton en vian agendon. Vi tiam povos partopreni en unu el la plej gravaj kaj grandaj Esperanto-renkontiĝoj en Belgio:

la fermofesto de la Semajno de Internacia Amikeco. ▮

Anoncu vian partoprenon:

esperanto3000.be/demandaro/sia.html

Amikeco trans limoj

(elprenebla aldonaĵo okpaĝa – 8 pagina's uiteneembare bijlage)

Itinero de la gvidata vizito en Loveno
Traject van het geleid bezoek in Leuven

22 – 2 – 2014

Breng deze bijlage (of je hele tijdschriftnummer) mee naar Leuven op 22 februari en ontdek samen met onze gids de originelen en de uitleg die bij elk van de foto's in deze bijlage horen.

Kunportu ĉi tiun aldonaĵon (aŭ vian plenan revunumeron) al Loveno en la 22a de februaro kaj malkovru kune kun nia gvidisto la originalojn kaj la klarigojn apartenantajn al ĉiu el la fotoj en ĉi tiu aldonaĵo.



0
Elirpunkto: Placo de la martiroj

1
Avenuo de la Aliancanoj

Justo Lipsio 2

5
Quinten Metsysplaco

4
Strato Jozefo II

3
Paserostrato

6
Erasmo-Instituto
(Kremlin)



Falanta ĉevalo 7

8 De Witte

9
Poezia Ĝardeno

12
Eduardo
Remy

11
Balono de la Amikeco



10
Universitata
centra biblioteko

13
Donatoparko

Abrahamo 14

15
Amiko 60

Sankta Donatoturo
16



Papa kolegio
18

Petro De Somer
17

Lieĝa kolegio (dekstre)
19

20
Domus

21
Muzeo M

Poŝtkruciĝo

Szilva Szabolcs, en “Esperanto” novembro 2013 (p. 235), artikolo transprenita kun afabla permeso de aŭtoro kaj redaktoro.

Internacia Semajno de Leter-skribado. Tio estas la unua frazo, kiu celas klarigi la esprimon poŝtkruciĝo, aperinta en afiŝo en Fejsbuko en la komenco de la monato. Fakte mem la nomo poŝtkruĉiĝo ne vere priksribas pri kio temas. Certe pri io Esperanta. Sed kio kruciĝas? Mi provu malkruci la konfuzan vortkunmeton.

Ĉu vi jam aŭdis pri *postcrossing*? Se jes, ĉio facile klarigeblas. Poŝtkruciĝo estas la E-lingva varianto kaj laŭvorta traduko de *postcrossing*. Se ne, tiam mi daŭrigu. La angla nomo estas parta paŭsaĵo de la esprimo *bookcrossing* (librokruciĝo) kiu simple estis la nomo de la firmao kiu unue iniciatis librokruciĝon. Librokruciĝo estas tiu projekto kiu emas igi la *tutan mondon biblioteko*: instigas homojn lasi librojn en publikaj lokoj kaj preni tiajn samajn de aliaj. Poŝtkruciĝo estas iusence io simila: komuna, por la tuta mondo, interago kun nekonatuloj. La diferencon oni povas ekkompreni daŭrigante la legadon en la Fejsbuk-paĝo de poŝtkruciĝo *(ndlr.: serĉu “poŝtkruciĝo” per google)*.

La ideo de E-Poŝtkruciĝo estas organizi interŝanĝon de poŝtkartoj inter esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj.

Kiel tio funkcias? Oni plenigas la aliĝilon ĉe *Google-docs*, enskribante siajn plenan nomon, landon kaj plenan poŝtadreson (tiuj informoj estos videblaj nur por la organizantoj) kaj sian retpoŝtadreson, al kiu la organizantoj sendos ĉiujn pliajn informojn. Post 2-3 tagoj oni ricevas la adreson de la homo (hazarde elektita), al kiu oni devas sendi la poŝtkarton. Tiel ĉiu aliĝinta sendos la poŝtkarton al iu el la sama listo, kaj espereble ĉiu poste trovos poŝtkarton en sia poŝtkesto.

Tre multaj homoj ŝatas ricevi poŝtkartojn. En la nova epoko ili donas simile grandan – se eĉ ne pli grandan – impreson: hodiaŭ estas ja facile iun ajn kontakti per la reto. Sendi belan poŝtkarton, skribi siajn vortojn per la propra mano kaj per inko, iri al la poŝto kaj enpoŝtigi ĝin ja donas alian impreson ol murmesaĝo en Fejsbuko.

Mi kiel Esperanto-instruisto aldonus, ke tio estas ankaŭ bona okazo por engaĝi nian grupon de novuloj en la E-movadon, por doni al ili iun kontakton por utiligi sian Esperanton. Krome oni povas instrui samtempe pri skribado de leteroj, retmesaĝoj, poŝtkartoj kaj pri la datoj en Esperanto.

Tamen mi restu ĉe la ĉefa temo. Estis jam simila projekto en Esperantio, kies nomo estis Semajno de Internacia Amikeco. Dum jardekoj okaze de la Semajno cirkulis poŝtkartaj salutoj inter E-kluboj kaj individuaj esperantistoj kaj la Semajno mem estis okazo por solenaj klubvesperoj. Tamen hodiaŭ la retpaĝo de UEA kadre de tiu semajno ne plu instigas je sendado de poŝtkartoj, sed je uzado de la emblemo de *Amikeco trans limoj* en diversaj – eĉ ne nepre Esperantaj – retpaĝoj. La ideo lanĉita de Erik Carlén, sveda E-aktivulo, i.a. plurjara vicprezidanto de UEA, celis doni la okazon al esperantistoj tra la mondo organiziĝi, por plifortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton de komuneco kun ĉiu, eĉ plej fore kaj izolite loĝanta esperantisto.

La eblo partopreni en tiu ĉarma projekto jam pasis, sed certe venontjare – se ne pli frue – vi povos sendi vian propran karton, kaj ankaŭ vin atendos ies ĉarma donaco en via poŝtkesto.

En la laborplano de Moskva Esperanto-Asocio MASI estas organizo kaj ekkunordigado de Esperanta Poŝtkruciĝo. Por tiom granda kaj temp-fort-raba iniciato necesas krei oportunan, teknike modernan kaj sufiĉe komplikan retejon, kiel, ekzemple, ĉe la oficiala internacia (sed baze de la angla lingvo) poŝtkruciĝa komunumo. Do, nun oni serĉas eblan kunlaboranton kaj invitas ĉiujn poste ankoraŭ plurfoje partopreni E-Poŝtkruciĝon.

Mi jam sendis mian poŝtkarton al Rusio. Kaj vi? ▮

¿?¿?¿?¿?¿?¿?

Raadsels…

In ons vorige nummer stonden een aantal raadsels. We kregen er wat reacties op. Dat doet altijd plezier: het geeft aan dat ons tijdschrift goed gelezen wordt.
We willen je die reacties niet onthouden:



3. Een gespierd paard zit vastgebonden aan een dik touw van zes meter lang. Zeven meter verderop staat een oude schuur gevuld met hooi. Toch kan het paard van het sappige hooi smikkelen. Hoe kan dat?
Antwoord: Het touw zit nergens aan vastgebonden.

Het touw mag ook wel vastgebonden zijn, als de paal waar het aan hangt maar tussen het paard en het hooi staat. Bijvoorbeeld: het touw zit vastgebonden aan een paal op drie meter van het hooi en het paard staat vier meter verder aan de andere kant van de paal. Lekker hooi!

5. In het jaar 1978 gebeurde er iets speciaals op de datum van 6 mei om precies 34 minuten na 12. Welk bijzonder fenomeen was dit?

Toegegeven: het antwoord “Het was precies 12:34 op de datum 5-6-78. Een uniek cijferpatroon in de geschiedenis.” was bijna juist. Maar niet helemaal. Want precies honderd jaar vroeger was diezelfde combinatie er ook al, in het jaar 1878! En honderd jaa ervoor ook en zo verder. Het woordje “uniek” in het antwoord was er dus net te veel aan. De jongsten onder ons zullen het op 6 mei 2078 zelf nog mogen meemaken!

10. Een man en een vrouw rijden rond in hun auto, onder de reis raakt hun brandstof op. De man loopt in zijn eentje met een jerrycan naar het benzinestation. Alleen hij en zijn vrouw zitten in de auto, voordat hij ging heeft de man de ramen en de deuren van de buitenkant op slot gedaan en is er zeker van dat alleen zijn vrouw in de auto zit. Hij komt terug met de brandstof en treft zijn vrouw dood aan in de auto, tevens is er een

vreemdeling bij haar aanwezig. Echter is er geen schade van de buitenkant aan de auto te vinden. Hoe kwam de vreemdeling in de auto terecht? Antwoord: De vrouw is bevallen van een kind en is zelf gestorven.

Of: de man is het open dak vergeten dicht te doen. Hoe dom kan je zijn!

11. Een stoere cowboy heeft twee dragen vrij gekregen van zijn sheriff. Hij besluit daarom om op woensdag lekker even er tussenuit te gaan. Na de twee dagen verlof keert hij wederom terug op woensdag. Hoe kan dat? Antwoord: De naam van zijn paard is woensdag.

Of, wie weet, misschien was zijn eerste verlofdag de woensdag voor Pasen en 26 april. Donderdag 27 april was dan Witte Donderdag en dus een vrije dag. Op vrijdag 28 april had zijn bedrijf een brugdag. Zaterdag 29 april en zondag 30 april vallen in het weekeinde. Maandag 1 mei is ook al een feest- en dus vrije dag. Dinsdag 2 mei is dan zijn tweede verlofdag, zodat hij op woensdag 3 mei terug gaan werken.
Helaas: Pasen valt op de eerste zondag na de eerste volle maan van de lente en dat kan hoogstens 23 april zijn, nooit 26 april.
Maar goed, wie weet is er wel een land waar die feestdagen van hierboven wel precies op zo'n combinatie van dagen vallen en kan deze alternatieve oplossing toch voorkomen? Met enige creativiteit... ■

...kaj "Ĉu vi sciis ke"

Alia leganto tiel reagis pri sciindaĵeto en nia antaŭa numero:

En la antaŭa eldono de nia revuo, ni donis longan tajlandan loknomon. Ŝajnas ke ni erare skribis ĝin kiel unu vorto, kiel *Heistaanzee*. Fakte, la nomo estas "*Krung Thep Mahanakhon Amon Rattanakosin Mahinthara Ayuthaya Mahadilok Phop Noppharat Ratchathani Burirom Udomratchaniwet Mahasathan Amon Piman Awatan Sathit Sakkathattiya Witsanukam Prasit*".

Ĝi estas la oficiala nomo de la urbo Bangkok, kaj signifas "Urbo de anĝeloj, grandioza urbo de senmortuloj, belega urbo de la naŭ gemoj, sidejo de la reĝo, urbo de reĝaj palacoj, hejmo de inkarnitaj dioj, konstruita de Visvakarman laŭ ordono de Indra".
Tajlandanoj normale diras "*Krung Thep Mahanakhon*", sed multaj konas la plenan nomon en la formo de kanto de Asanee-Wasan el 1989, kiu nur ripetas la urbonomon.
La nomo "*Bangkok*", uzata de eksterlandanoj, estus, laŭ unu el la eblaj klarigoj, malpreciza indiko al iu "enloĝata insulo en rivero". ■

Smoelenboek - Vizaĝlibro

Wie kan nog zonder?? Dus kon ook Esperanto 3000 niet wegblijven.

Voor de laatste weetjes, nieuws, foto's en nog veel meer kan je sinds enkele maanden al terecht op Facebook. Zoek de pagina van Esperanto 3000 op en 'like' ze. Vind je ze niet? www.facebook.com/esperanto3000

Je kan nog beter doen: verander heel je eigen facebook naar Esperanto. Dit doe je door rechtsbovenaan op 'account settings' te klikken. Daar kan je de taal veranderen in de 'general' tab. Esperanto staat bij de aangeboden talen.

Kiu povas pluvivi sen ĝi?? Do ankaŭ Esperanto 3000 ne povis forresti

La lastajn sciindaĵojn, novaĵojn, fotojn kaj multe pli vi ekde kelkaj monatoj trovas jam en Fejsbuko. Serĉu la paĝon de Esperanto 3000 kaj “ŝatu” ĝin. Ĉu vi ĝin ne trovas? www.facebook.com/esperanto3000

Eblas eĉ pli bone: ŝanĝu vian tutan propran fejsbukon al Esperanto. Tion vi faros klakante dekstre supre al 'account settings'. Tie vi povos ŝanĝi la lingvon en la 'general' karto. Esperanto troviĝas inter la ofertataj lingvoj. ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668
erkenning 602233
klant 2410904

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift Dumonata revuo
Januari-februari 2014 jr. 35 nr1 Januaro-februaro 2014
V.U. Goris Roger, R. Menadastraat 44, 1320 Hamme-Mille Afgifte: 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero:

W.I.V. - S.I.A.
Poŝtkruciĝo
Aldono: itinero SIA
Bijlage: traject WIV
Raadsels
Ĉu vi sciis ke...
Smoelenboek - Vizaĝlibro

Semajno de Internacia Amikeco

Loveno - 22.2.2014 - Leuven

Week van de Internationale Vriendschap

Bonvenon ! – Welkom !
http://esperanto3000.be/demandaro/sia.html

Esperanto 3000



Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum ‘Romaanse Poort’, Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld. Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

Woensdag 9/04/2014	Vespero 3000: babilvespero	19:30-22:30
Woensdag 23/04/2014	Daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto unua Ĝenerala kunsido	20:00-22:00
Woensdag 14/05/2014	Vespero 3000: programo sekvos dua Ĝenerala Kunsido	19:30-22:30
Woensdag 28/05/2014	Daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto	20:00-22:00
Woensdag 11/06/2014	Vespero 3000: programo sekvos senpagaj trinkaĵoj!	19:30-22:30
Zaterdag 21/06/2014	Zócalo, informbudo pri Esperanto en Grote Markt	10:00-18:00

ESPERANTO 3000
Revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven, asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
Aperas 6-foje en la jaro
www.esperanto3000.be
Kontaktadresoj / Contactadressen
info@esperanto3000.be
Karekietlaan 14, 3010 Kessel-Lo
Roger Goris (sekretaris), Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille ☎ 010 860 112; goris.r@skynet.be
Frans Croon (voorzitter) ☎ 016 655 944 frans.croon@kampenhout.be
Membreco / Lidmaatschap E.3000
Membro/lid Eo3000 + FEL = € 25,00
Esperanto 3000 = € 12,50 (nl/eo) (alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Andere abonnementen betaal je liefst aan FEL, op rekening 402-5510531-55, met vermelding van "abono E3000"
Membreco / Lidmaatschap UEA
Membro/lid UEA + jarlibro = € 26,00
Same/idem + Esperanto € 63,00

Abonoj / Abonnementen (2013)
Horizon-taal, JEN(ĝis 29-jara) = € 25,00
Idem/same + Monato = € 77,00
Horizon-taal = € 25,00 (nl/eo)
Monato = € 53,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 30,00, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 6,00 (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 40,00 (eo)
Juna Amiko = € 16,00, por infanoj (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 32,00 (eo)
Kancerkliniko = € 27,50 (eo)
Kontakto = € 24,00, komencantoj (eo)
La ondo de Eo = € 42,00 (eo)
ILEI + Int. Pedagogia Revuo = € 22,00 (eo)

Reklamo / Reclame
1 p. € 10, 1/2 p. € 6, 1/4 p. € 4, 1/8 p. € 3
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Ĝenerale / Allerlei
Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk de gewenste categorieën aan te geven. Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

De la redakcio

La jara formala kunsido denove alvenas.

Ni invitas ĉiujn niajn gemembrojn al le Ĝenerala Kunsido de merkredo la 23-an de aprilo.

Se tiam ne aperos minimume duonon de niaj gemembroj, ni invitas ĉiujn ankaŭ al la dua Ĝenerala Kunsido en la 14a de majo. Tiu kunsido povos decidi, kiom ajn estu la nombro de ĉeestantoj.

Tagordo:
- superrigardo aktivecoj 2013
- planoj 2014
- financaj rezultoj 2013
- buĝeto 2014
- elekto de nova estraro
- diversaĵoj

Bonvenon al ambaŭ kunsidoj!

Kunlaboris, alfabete:
Marc Vanden Bempt (afwerking, sendado), Helena Van der Steen (redaktoro), la aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

Voorwoord van onze voorzitter
Taalactiviteiten

Gek incidentje vanmorgen op de radio. Een in het Engels geïnterviewde buitenlander gebruikt het woord ‘think’. Blijkbaar heeft men hem vroeger op school, zoals bij mij, geleerd hoe je die moeilijks “th-klank” goed moet uitspreken. Maar het lukt hem toch niet al te best en klinkt dan zowat als ‘tsf’. Wat een van de twee presentatoren de opmerking ontlokt: heeft hij nu nagedacht, of is hij gezonken (sink)?.
Ik heb ook de indruk, maar kan fout zijn want niet bewust nageteld, dat er op radio en TV meer en meer Engelstalige bijdragen komen zonder vertaling of duiding van wat er gezegd is. Blijkbaar gaat men er van uit dat ‘iedereen’ vlot Engels verstaat en spreekt. Een toch wel boude veronderstelling als je weet dat Engelstalige kinderen,‘native speakers’, er 3 à 4 jaar over doen om een leesniveau te bereiken dat anderstalige kinderen al na 9 à 14 maand bereiken. Vroeger heette dat: “pour les Flamands même chose”.
De relatie tussen talen en de sprekers(groepen) ervan is altijd al een heikel punt geweest. Enerzijds is er de groepsband (“Taal is gans het volk”), anderszins is er de nood aan klare communicatie over de groepen heen. Overwicht van een nationale taal geeft aanleiding tot gevoelens van onbehagen door aantasting van de groepsidentiteit en minderwaardigheidsgevoel omdat men de taal niet op gelijkwaardig niveau beheerst. Engels is een mooie en rijke taal; net als honderden andere, laat daar geen twijfel over bestaan. Maar Engels is ook zeer gecompliceerd door zijn zeer uitgebreid klankenpalet en de vele uitdrukkingen en idiomen die iets heel anders uitdrukken dan het op het eerste zicht lijkt.

De overtuiging dat het Esperanto daarvoor het betere alternatief is houdt al 125 jaar de Esperantobeweging overeind en levendig. Kijk maar naar de vele internationale samenkomsten die weer op het getouw staan. De beweging heeft zich ook meestal goed aangepast aan de tijd. Zie maar de zeer uitgebreide activiteiten op het internet.

Je kan je vereniging ook meehelpen bij de tijd te zijn door naar de (tweede) Algemene Vergadering te komen (zie Activiteitenkalender) en daar je inbreng te doen. Tot dan!?

Frans Croon, voorzitter

La jenan desegnon ni ricevis de Leona Meurrens. La originalo estas kolora.

Ĝia origino bedaŭrinde ne estas konata. Ĝi sendube aĝas multajn jarojn.

Tago de la Flandraj Ardenoj

NATURO, KULTURO kaj... ESPERANTO en la FLANDRAJ ARDENOJ

dimanĉon la 27an de aprilo 2014

organizado: 'LA KONKORDO' – KORTRIJK

'La Flandraj Ardenoj' estas la nomo, kiun oni donis al monteta regiono en la okcidenta parto de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk.

Dum la 'Tago de la Flandraj Ardenoj' la lokaj naturasocioj volas konatigi la naturriĉecon de sia regiono al plejeble granda publiko. Sed la Flandraj Ardenoj ankaŭ riĉas je kulturo. Pro tio ni volas kombini la organizadon kun vizito de interesa kultura ero en la regiono.

Nature...

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze je 9h la arbaran rezervejon 'Steenbergse Bossen' en Zottegem.
Rendevuloko: centro de Sint-Goriks-Oudenhove (Kruiswaterplein).

... kaj kulture

Postagmeze ni veturos al Velzeke (Zottegem) kie ni vizitos je 14h30 la Provincan Arĥeologian Muzeon (adreso: Paddenstaat 7) sub gvido de loka

ĉiĉerono. Velzeke estis, dum la gaŭlo-romia erao, kruciĝo de gravaj romiaj vojoj ekz. inter Bavay kaj Gent kaj inter Tongeren kaj Cassel.

Praktike



La tago konsistas el gvidata promenado matene kaj posttagmeze vizito de muzeo. Eblas partopreni nur unu el ambaŭ aktivecoj. Vidu la aliĝilon.

Lokaj fakuloj gvidos nin nederlandlingve. Ni kompreneble provizos esperantlingvan tradukadon se ĉeestos alilingvanoj.

Por la antaŭtagmeza naturpromenado vi plej bone provizos vin per botoj! Sed ne timu: estas nek 'fakekskurso' nek 'sportkonkurso'. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj.

Alportu mem vian piknikon.

La rendevulokoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne, prenu sufiĉe fruan trajnon al Zottegem kaj nepre avertu nin!

Por la tuta tago ni petas kotizon de 4 €. Ebla profito iros al la 'Naturfonduso Flandraj Ardenoj'.

Post aliĝo vi ricevos ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn).

Ne prokrastu vian aliĝon!

Tri bonaj kialoj por partopreni

Unue. Malkovru naturon kaj kulturon en bela flandra regiono dum la plej bela sezono.

Due. Apogu la klopodojn de la lokaj naturasocioj por konservi la ekologian kaj estetikan valoron de la regiono.

Trie. Montru al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo funkcias.

Ook apen kennen bepaalde spraakstructuren

(Már a majmok is felismerik a beszéd egyes szerkezeteit , MTI, 2013.11.13, uit het Hongaars vertaald door Marc Vanden Bempt)

Volgens Weense onderzoekens kennen ook de apen bepaalde eenvoudige structuren van de spraak, van de herhaling en het wijzigen van klanken.

Bij de gemeenschappelijke voorouder van de hedendaagse mens en de apen vormde de bekwaamheid tot zingen zich minstens 30 miljoen jaar geleden - zo valt te lezen in een studie van de onderzoekers van de Universiteit van Wenen, verschenen in het wetenschappelijk tijdschrift Biology Letters. Het onderzoek geldt ook als verklaring voor de vraag, waarom de chimpansees op de wortels van bomen trommelen en waarom de roepstem van de apen als muziek klinkt.

Andrea Ravignani, de auteur van de studie, doctorandus aan de cognitief-biologische leerstoel van de Weense Universiteit, vertelt: het verschijnen van de muzikale bekwaamheid kan de eerste stap zijn tot de kennis van het regelsysteem van spraakklanken en bijgevolg van de ontwikkeling van de taal.

De wetenschappers onderzochten tot nu toe alleen de reactie die de dieren op de menselijke spraak vertonen, nu echter wijzigden ze de klankvoorbeelden zo, dat deze beter overeenkomen met de biologische eigenschappen van de grijsgroene doodshoofdaapjes.

Ze werkten een klanksysteem uit dat voortbouwt op de natuurlijke klank- en gehoorscapaciteiten van de onderzochte, op echt hoge frequentie communicerende apensoort. De voor de proefdieren afgespeelde muzikale fragmenten klinken dus als apenklanken, terwijl de structurele kenmerken tegelijk overeenkomst vertonen met fragmenten te vinden in veel menselijke talen.

Zo moet men zich voorstellen dat bij het autorijden achterin de kkleine kinderen voortdurend "papa, papa, papa,..." zouden herhalen, terwijl de ouder er geen aandacht aan schenkt, tot op een bepaald moment ze één keer "mama" zeggen en dat de volwassene haar hoofd draait, zo legt Ravignani uit.

(vervolg op pagina 10)

Ankaŭ simioj konas iujn parolstrukturojn

(Már a majmok is felismerik a beszéd egyes szerkezeteit , MTI, 2013.11.13, tradukis el la hungara Marc Vanden Bempt)

Laŭ vienaj esploristoj ankaŭ la simioj konas iujn simplajn strukturoj de la parolo, de la ripetado kaj modifado de sonoj.

Ĉe la komuna praŭlo de la nuntempa homo kaj la simioj, la kapablo pri kantado formiĝis antaŭ almenaŭ 30 milionoj da jaroj - tiel legeblas en studo de la esploristoj de la universitato de Vieno, aperinta en la scienca revuo Biology Letters. La esploro validas ankaŭ kiel klarigo por la demando, kial ĉimpanzoj tamburaj sur la radikojn de arboj kaj kial la vokvoĉo de la simioj sonas kiel muziko.

Andrea Ravignani, la aŭtoro de la studo, doktorando ĉe la konoteorie-biologia katedro de la viena Universitato, rakontas: la apero de la muzika kapablo povas esti la unua paŝo al la kono de la regulsistemo de parolsonoj kaj sekve de la evoluado de la lingvo.



La sciencistoj priesploris ĝis nun nur la reagon kiun la bestoj montras al la homa parolo, nun tamen ili modifis la sonekzemplojn tiel, ke tiuj pli bone kongruas kun la biologiaj ecoj de la verdgrizaj sajmiriaj simioj.

Ili ellaboris sonsistemon kiu plukonstruas sur la naturaj son- kaj aŭdkapabloj de la esplorita, vere altfrekvenca komunikadanta simiospecio. La por la eksperimentaj bestoj ludataj muzikaj fragmentoj do sonas kiel simiosonoj, dum la strukturaj ecoj samtempe kongruas kun fragmentoj troveblaj en multaj homaj lingvoj.

Tiel oni imagu ke dum la aŭtoveturado malantaŭe la infanetoj daŭre ripetus " paĉjo, paĉjo, paĉjo,…" dum la gepatro ne atentas tion, ĝis iu momento kiam ili unufoje diras "panjo" kaj ke la plenkreskulo turnas la kapon, tiel Ravignani klarigas.

(daŭrigo en paĝo 10)

(vervolg van pagina 8)

De doodshoofdaapjes beluisterden tijdens bij het onderzoek twee soorten klankmateriaal. In het ene werden gewoon gelijkaardige klankstructuren herhaald, in het andere kwamen door elkaar gelijkaardige en afwijkende klankstructuren voor. Tussen het afspelen door gaven de onderzoeken hen eten, zo gingen de apen deze activiteiten snel graag uitvoeren.

De onderzoekers merkten op, dat wanneer de herhaalde klankrij verandert, de doodshoofdaapjes langer hun ogen opentrokken, net alsof ze verwonderd waren over wat er gebeurde. Het experiment toonde aan, dat de apen de gelijkaardige klanken herkenden, maar ook dat ze merkten wanneer deze veranderden. Deze bekwaamheid, nodig voor zowel muziek als spraak, ontstond dus al bij de gemeenschappelijke voorouder van de mens en de aap en waarschijnlijk is ze te vinden bij alle hedendaagse primaten.

(daŭrigo de paĝo 9)

La sajmiriaj simioj aŭskultis dum la esploro du specojn da sonmaterialo. En unu simple similaj sonstrukturoj ripetiĝis, en la alia miksiĝis ingter si similaj kaj malsimilaj sonstrukturoj. Inter la ludado la esploristoj nutris ilin, tiel la simioj rapide ekŝatis fari tiujn ĉi aktivecojn.

La esploristoj rimarkis ke, kial la ripetita sonvico ŝanĝiĝas, la sajmiriaj simioj pli longe malfermis siajn okulojn, kvazaŭ ili miris pri kio okazis. La ekspeerimento montras, ke la simioj rekonis la similajn sonojn, sed ankaŭ ke ili rimarkis kiam tiuj ĉi ŝanĝiĝis. Tiu ĉi kapablo, necesa pro same muziko kiel parolo, ekestis do jam ĉe la komuna praulo de la homo kaj la simio kaj verŝajne ĝi ankaŭ troveblas ĉe ĉiuj nuntempaj primatoj.

Lingva Festivalo Leuven: LIA-kandidato

Het Talenfestival in Leuven was genomineerd voor een *LIA*, ironisch genoeg een Engelse naam (*Language Industry Award*) voor een prijs in het Nederlandse taalgebied. Deze prijs werd op 14 maart uitgeloofd door de *Taalsector*. Zie http://www.languageindustryawards.eu/?p=402

GentVertaalt won met 46% van de stemmen in de categorie "Beste netwerk- en leerevenement 2013". Daarmee ging het ons Talenfestival maar ook Drongo Festival en LT-innivate summit voor.

Spritaĵoj

La sovaĝuloj.

Misiisto estas invitita al familia tagmanĝo. La filino venas en iom dekoltita vestaĵo, tial la familiestro volas peti indulgon de la misiisto, parolante pri la nuna modo. “Ho, ne zorgu”, diris ĉi tiu, “tio tute ne ĝenas min, mi ja vivis dum dek jaroj inter sovaĝuloj.”
Granda peno.
A.: "Ĉu vi kredas, ke hodaiu matene mi havis penon, por decidigi mian botiston, akcepti de mi 5 spesmilojn?"
B.: "Tio ne okazis ĝis nun! Kial do?"
A.: "Jes, li nepre postulis dek."

Venĝo.

Vidvino de jurista konsilanto (al sia iama kuiristino): “Laŭ tio, kion mi aŭdis, vi edziniĝis, – kiun metion do havas via edzo?”
Kuiristino:”Tondil-akrigisto, sinjorino.”
Vidvino de jurista konsilanto: “Ĉu vere? Estas simpla metio!”
Kuiristino: “Nu, mi opinias, ke vivanta tondil-akrigisto valoras pli multe ol mortinta jurista konsilanto!”

Lasta provo.

Li: “Kara Anjo! Kio estas por ni la vivo – nur mizero. Se vi volas morti kune kun mi, prenu tiun ĉi pistolon!” –
Ŝi: “Jes, karulo, mi volas. Unue mi mortpafos vin kaj poste vi min!”

Konciza tosto.

La virinoj malpliigas nian doloron, duobligas nian ĝojon kaj triobligas niajn elspezojn. Ili vivu!

Kondiĉe.

Profesoro: “Ĉu mi rajtas peti la favoron dediĉi tiun ĉi mian plej novan literaturan verkon al via moŝto?”Moŝto: “Se mi ne devas legi ĝin – jes!” ■



België – Belgique
P.B.
3000 Leuven 1
2/2668
erkenning 602233
klant 2410904

Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift Dumonata revuo
maart-april 2014 jr. 35 nr2 Marto-aprilo 2014
V.U. Goris Roger, R. Menadastraat 44, 1320 Hamme-Mille Afgifte: 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero:

Ĝenerala kunsido
Taalactiviteiten
Tagio de la Flandraj Ardenoj
Ook apen...
Ankaŭ simioj...
Spritaĵoj

Ben je nog steeds geen lid voor 2014?
zie / vidu p. 2 (25€ al Esperanto 3000, BE21 7343 3319 4403 kredbebb)
Je spaart ons een herinneringsbrief – Vi evitos al ni memorigan leteron
Ĉu vi ne jam membras por 2014?

Philipssite (momenteel : Financiën)

Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort', Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld.
Het programma van de Vespero 3000 = daŭriga kurso begint om 20 uur.

Donderdag 11/09/2014	Vespero 3000: daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto *	19:30-22:30
Zaterdag 27/09/2014	*La Hirundo organiseert een eendaagse en wij gaan mee. Details vind je in dit nummer*	*07u50-~18u*
Donderdag 9/10/2014	Vespero 3000: daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto *	19:30-22:30
Donderdag 13/11/2014	Vespero 3000: daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto *	19:30-22:30
Donderdag 11/12/2014	Vespero 3000: daŭriga kurso / Vervolgcursus Esperanto *	19:30-22:30

* Het niveau van de vervolgcursus wordt aangepast aan de aanwezigen.

ESPERANTO 3000
Revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven, asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
Aperas 6-foje en la jaro
www.esperanto3000.be
Kontaktadresoj / Contactadressen
info@esperanto3000.be
Karekietlaan 14, 3010 Kessel-Lo
Roger Goris (sekretaris), Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille ☎ 010 860 112; goris.r@skynet.be
Frans Croon (voorzitter) ☎ 016 655 944 frans.croon@kampenhout.be
Membreco / Lidmaatschap E.3000
Membro/lid Eo3000 + FEL = € 25,00
Esperanto 3000 = € 12,50 (nl/eo) (alleen voor FEL-leden via andere clubs)
Andere abonnementen betaal je liefst aan FEL, op rekening 402-5510531-55, met vermelding van "abono E3000"
Membreco / Lidmaatschap UEA
Membro/lid UEA + jarlibro = € 26,00
Same/idem + Esperanto € 63,00

Abonoj / Abonnementen (2014)
Horizon-taal, JEN(ĝis 29-jara) = € 25,00
Idem/same + Monato = € 77,00
Horizon-taal = € 25,00 (nl/eo)
Monato = € 53,00, por ĉiuj (eo)
Ret-Monato = € 30,00, por ĉiuj (eo)
Agenda "La Jaro" € 6,00 (eo)
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)
Esperanto (UEA) = € 40,00 (eo)
Juna Amiko = € 16,00, por infanoj (eo)
La gazeto (OSIEK) = € 32,00 (eo)
Kancerkliniko = € 27,50 (eo)
Kontakto = € 24,00, komencantoj (eo)
La ondo de Eo = € 42,00 (eo)
ILEI + Int. Pedagogia Revuo = € 22,00 (eo)

Reklamo / Reclame
1 p. € 10, 1/2 p. € 6, 1/4 p. € 4, 1/8 p. € 3
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Ĝenerale / Allerlei
Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk de gewenste categorieën aan te geven. Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

De la redakcio

Onze voorzitter legt het hiernaast al uit: Esperanto 3000 zet een stapje terug. Tegelijk zijn er plannen om een ideeën bij te steken, om meer te profiteren van het online-gebeuren.
Een avondcursus voor beginners hoeft niet, www.lernu.net neemt die rol over. Wie daar Esperanto leerde willen we wel ondersteunen om het beter onder de knie te krijgen. Dat wordt onze rol in de toekomst.

Ook voor ons tijdschrift komen de laatste nummers er aan. Dit is een dubbel nummer, het volgende wordt ook een dubbel nummer en dan gaan we vermoedelijk een tijdje niet meer verschijnen.

Horizon-taal zal onze rol overnemen: ons programma ga je voortaan op de laatste bladzijden van Horizon-taal kunnen vinden.

We rekenen er op dat je, ook met deze heroriëntatie van de werking Esperanto 3000 zult blijven steunen als lid. Maar daar hebben we het in volgend nummer nog over.

De redactie.

Kunlaboris, alfabete:
Marc Vanden Bempt (afwerking, sendado), Helena Van der Steen (redaktoro), la aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

Voorwoord van onze voorzitter

Achteruitgaan...

Het is al enkele weken geleden dat we met een stand op Zocalo stonden. Dat was op de “Langste Dag”, zowel astronomisch als in Leuven,. Je merkt nu het korten van de dagen. Voor velen het einde van de vakantieperiode, voor anderen een buitenkans om goedkoper, buiten hoogseizoen, nog vakantie te nemen. Ik hoop dat je er van genoten hebt en nog van kan genieten.

Voor Esperanto 3000 start in september het nieuwe werkjaar. Dat is traditie. Minder traditioneel is dat het bestuur besloot de werking bij de tijd te brengen en ook de tering naar de nering te zetten.
Clubbijeenkomsten worden (veel) minder bijgewoond, een verschijnsel waarover zowat gans het verenigingsleven klaagt. Maar de vaste kosten blijven even hoog; denk maar aan huur van het lokaal. Daarom wordt de “Daŭriga Kurso” samengevoegd met de “Vespero 3000” op de tweede **donderdag** van de maand. Het programma blijft even gevarieerd, maar is meer gecondenseerd en per avond ook meer gevarieerd. We besparen per maand 1 avond huur lokaal ☺; maar hebben ook 1 activiteit minder ☹.

Ook op “grote” manifestaties wordt bespaard! In de toekomst gaan we de SIA niet meer organiseren. Ander verenigingen mogen dit zien als een uitnodiging om het over te nemen, waarbij ze wel kunnen terugvallen op onze ervaring. Het Talenfestival in 2015 is nog onzeker, er loopt nog overleg. Maar na 2015 staat het zeker niet meer op ons programma. Het blijft wel mogelijk dat we meewerken met organisaties van anderen (univ., hogeschool) om ook Esperanto als taal te promoten.

Dit alles klinkt wat pessimistisch maar moet zo niet opgevat worden. Een club is een instituut zoals vele andere. Ze ondersteunt een doelstelling, een ideaal,… Voor ons is dat het taalproject en de idee achter Esperanto. Een instituut bestaat niet om te bestaan. Maar een failliet instituut kan niet meer ondersteunen. Aanpassingen zien we overal rondom ons gebeuren. Kijk maar naar de industrie, de banken, FEL, de overheid,…
Van de Fransen leerden we; “achteruitgaan om beter te kunnen springen”. Dat is de bedoeling van onze maatregelen. Zie je andere, betere mogelijkheden? Deel ze met ons: samen kunnen we meer en beter organiseren.

Frans Croon, voorzitter

Spritaĵoj

Duspecaj opinioj.

Advokato: “Mi tre volonte akceptus vin por mia servo kiel skribisto, sed bedaŭrinde mi havas tre malmulton por fari.”
Skribisto: “Des pli bone, sinjor' doktoro!”

Eliĝinta el la kaptilo.

(En bonfara bazaro.)

Fraŭlino: “Sinjoro, vi certe aĉetos de mi tiun ĉi malgrandan bukedon!”
Sinjoro: “Volonte, fraŭlino! Kiom ĝi kostas?”
Fraŭlino: “Nu, ni diru 10 spesmilojn!”
Sinjoro: “Fraŭlino, tio estas tro multekosta por mi!”
Fraŭlino (premante kison sur la bukedon): “Kaj nun, sinjoro?”
Sinjoro (forturnante sin): “Nun ĝi estas nepagebla por mi!”

Efika rimedo.

Kuracisto (al babilema sinjorino): “Montru al mi vian langon!” (La sinjorino obeas.) “Bone, kaj lasu la langon ekstere ĝis mi ĉesis paroli.”

Vana konsilo.

Kuracisto: “Ion ankoraŭ mi urĝe konsilas al vi: ne trinku tro multe da biero!”
Paciento: “Ho, sinjor' doktoro, ne zorgu pri tio - por mi ĝi neniam estas tro multe!”

Je fremdaj kostoj.

Mallerta, fervora Nimrod' iras ĉasi, sed malfeliĉe havas nenian okazon por ion trafi. Plej malĝoja li iras hejmen. Li venas al domo, kie staras vilaĝano apud kelkaj kokinoj.
Nimrod' ne povas kontraŭstari la tenton kaj diras al la vilaĝano: “Aŭdu, mia kara, kion mi devos doni al vi, se vi permesos al mi, pafi al la kokinoj?”
“Nu, donu 2 spesmilojn!”

Nimrod' donas la postulitan monon, pafas, kaj la kokinoj falas je ĉiuj flankoj. Nur nun li pripensas, ke la kontrakto nur estas duone farita, kaj demandas la vilaĝanon: “Ĉu mi nun povas kunpreni la kokinojn?”
“Mi ne malkonsentas – al mi ili ne apartenas, mi estas fremda tie ĉi.”

Por la estonteco.

Pastro festas la bapton de sia dekkvina infano.
Kiel kutime, sur la tablo staras grandega bapto-kuko.
“Kara edzino”, diris la pastro mediteme, “hodiaŭ la kuko tute ne estas bongusta laŭ mia opinio. La proksiman fojon ni iru al alia bakisto.”

Programstilo.

Per la eniro de sinjoro la urbestro la bestekspozicio estas malfermita.

Bona obeo al la leĝo.

Imposta oficisto: “Sinjoro, vi fumas importitajn cigarojn. Ĉu vi ne scias, ke tio estas malpermesite?”
Vojaĝanto: “Certe mi tion scias. Ĉu vi ne vidas ke mi ilin neniigas per fajro?”

La flavaj kaj la blankaj butonoj de uniformo.

Kaporalo: “Majer, diru, kial la diversaj regimentoj portas aŭ flavajn aŭ blankajn butonojn?”
Majer: “Por butonumi, sinjoro kaporalo!”

Frapanta simileco.

Multsemestra studento: “Ĉiutage mi trovas ĉe vi frapantan similecon inter viaj bonaj ideoj kaj viaj ĉemizaj butonoj.”
Unusemestra studento: “Kial?”
Multsemestra studento: “Ambaŭ kutime mankas al vi.”

Dum pensia tagmanĝo.

Direktoro: “Kiu nun manĝos plej multe da terpomoj, poste ricevos la plej grandan pecon da viando!” (Granda silento. La knaboj manĝas fervorege). Kiu el vi nun estas tute sata?”
Ĉiuj: “Mi, mi, mi!
Direktoro: “Tiam vi nun ne bezonas viandon, ni konservu ĝin por morgaŭ!”

La ombroludo.

Majoro (al leŭtenanto): “Sinjoro leŭtenanto, vi restos tie ĉi kun via taĉmento!”
Leŭtenanto: “Jes, sinjoro majoro!”
(Unu horon poste.)

Majoro (kolere): “Sinjoro leŭtenanto, mi ordonis al vi, ke vi restu ĉe la sama loko!”
Leŭtenanto: “Pardonu, sinjoro majoro, mi ne forlasis la lokon.”
Majoro: “Silentu! Mi scias tion pli bone. Mi lokis vin en sunlumon kaj nun vi estas en ombro!”

El katehismo.

Pastro: “Doni estas pli feliĉige ol akcepti. Kiel oni devas kompreni tion? Petro, diru, kiel vi ĝin komprenas!”
Petro: “Ho, tion mi bone komprenas.”
Pastro: “Nu, diru al mi ekzemplon. Kiamaniere estsas pli bone: doni ol ricevi ion?”
Petro: “Estas pli bone doni vangofrapon ol ricevi ĝin!”

Malbona regiono.

Sinjorino: “Ho, kiel plena de floroj estas tiu ĉi persikarbo! Vi havos bonan rikolton.”
Vilaĝano: “Ho, Dio! En tiu ĉi regiono, ili maturiĝas neniam.”
Sinjorino: “Ĉu do la klimato estas tiel malfavora tie ĉi?”
Vilaĝano: “Ne, sed la buboj jam manĝas la fruktojn, dum ili estas ankoraŭ nematuraj.”

Dormigilo.

Izako (meznokte al sia kundormanto Jakobo): “Se mi nur sciis, kion mi devas fari, – mi povas dormi nenian nokton pro multaj zorgoj, devante morgaŭ pagi kambion de 300 spesmiloj al la Herŝ!”
Jakobo: “Volas mi doni al vi konsilon: leviĝu, surmetu vestojn, iru al la Herŝ, vekigu lin, kaj diru al li, ke vi ne povos pagi la kambion. Tiam li havas la zorgon, vi ĝin senigis kaj povas ree dormi!”

Postmorta promocio.

Sur la tombejo de malgranda urbeto troviĝis antaŭ jaroj tomba ŝtono kun jena surskribaĵo: “Tie ĉi ripozas la altestimata sinjorino N. N., edzino de juĝista adjunkto.”
Pasis jaroj; la senkonsola vidvo dume promociis al distrikta juĝisto. La fidela edzo, dezirante partoprenigi je tiu propocio ankaŭ sian delonge mortintan edzinon, ĉizigis sub la vortoj “edzino de juĝista adjunkto” la vortojn “nune edzino de distrikta juĝisto.”

Brita esploristo malkovris la sekreton de Ruĝkufulineto kaj la lupo

(el Hirado.hu, 2013.11.14; fontartikolo: Plos One, November 13, 2013, DOI: 10.1371/journal.pone.0078871, tradukis el la hungara Marc Vanden Bempt)



Pretiĝis la evolucia arbo de Ruĝkufulineto kaj la lupo. Laŭ ĝi la fabelo retroirus al historio okazinta en la unua jarcento antaŭ kristo, en kiu la lupo ŝajnigis sin la patrino de la kapridetoj kaj ilin formanĝas.
La sekreton de Ruĝkufulineto kaj la lupo malkovris brita antropologo pere de matematika modelo.

La esploristojn jam delonge fascinas, kiom forte inter si rilatas la fabeloj rakontataj de buŝo al buŝo en la diversaj kulturoj. La historia-geografia tendenco eliras de la ideo ke la similajn rakontojn eblas vicigi laŭ internaciaj tipoj kaj la apartajn grupojn eblas retroigi al komuna, praa, origina fabelo.

La esploristo uzis matematikan modelon, nomatan 'filogentika analizo', per kiu la biologoj priesploras la originon kaj ekestadon de la specioj. Helpe de la modelo nun pretiĝis la "evolucia arbo" de Ruĝkufulineto kaj la lupo.

La studo aperis en la lasta numero de la scienca revuo Plos One.

Jamie Tehrani, antropologo de la Universitato de Duram kaj aŭtoro de la studo, montris ke Ruĝkufulineto kaj la lupo kaj alia populara fabelo, vivanta sur la lipoj de multaj popoloj, la Lupo kaj la sep kapridetoj, retrokupliĝas al komuna praulo.

Klariĝis ke la Lupo kaj la sep kapridetoj unue ekestis, en la unua jarcento antaŭ kristo. Ĝi temas pri tio, ke la rabobesto ŝajnigas sin la patrino de la etuloj kaj poste forvoras ilin. Ĝi iĝis populara en Eŭropa kaj la Proksima Oriento.



Ruĝkufulineto kaj la lupo, en kiu la granda, fia sovaĝbesto vestita en la vestaĵoj de la avino trompas kaj formanĝas la knabineton, originas de ĉirkaŭ mil jaroj poste. La rakonto en la 19a jarcento ankaŭ alvenis en la kolekton de la fratoj Grimm, sed laŭ la esploristoj de Tehrani ĝiaj radikoj troviĝas en francaj, aŭstraj kaj norditalaj popolfabeloj disvastigitaj de buŝo al buŝo.

La diversaj versioj de la rakonto, inter kiuj tiu kun la titolo Tigroavino, estas rakontataj en multa landoj de Afriko kaj Azio, inter kiuj ankaŭ Japanio, Ĉinio ka Koreio.
Tehrani pristudis 58 variaĵojn de la fabelo laŭ la metodo de la filogenetika analizo. En la laboro li koncentriĝis al 72 variabloj, inter kiuj ĉu la ĉefrululo estas knabo aŭ knabino, eventuale gefratoj, ĉu la malbonon personigas lupo, tigro aŭ alia besto, kiun ruzaĵon uzas la rabobesto, ĉu oni ĉe la fino savas la ĉefheroon aŭ ne. Ĉiu variablo ricevas poentojn surbaze de la probableco ke la origino estas la sama. Surbaze de la poentnombroj desegneblas la arbo, kiu prezentas la plej verŝajnan vojon de la etendiĝo de la rakonto.

Tehrani eksplikas ke, laŭ la populara opinio la origina variaĵo de Ruĝkufulineto kaj la lupo estas ĉina popolfabelo kaj de tie la rakonto disetendiĝis al Eŭropo. El la anlizo tamen montriĝas ke la ĉina variaĵo baziĝas sur eŭropa buŝa tradicio kaj ne inverse.
Per la sama metodo la esploristo ankaŭ analizis la originon de aliaj popolfabeloj. Li esperas ke la plikompletigo de la tiel akiritaj informoj servos al pli bona komprenado de la praaj popolmigradoj.

La angla super ĉio?

(Angol mindenek felett?, Wirth Gábor in Magyar Nemzet, 20.11.2013; traduko el la hungara: Marc Vanden Bempt)

Laŭ la profesoro Jürgen Trabant de la Jacobs Universitato en Bremen "la angla forpuŝas la grandajn kulturlingvojn".

La senbridan trarompon de la angla lingvo en la scienca, ekonomia kaj ĉiutaga vivo la profesoro taksas la plej granda danĝero por la franca, la itala kaj la germana. En la scienca vivo la angla antaŭe unualoke estis la lingvo de la natursciencoj, hodiaŭ ankaŭ la filozofisciencaj prefere publikigas en la angla.

Kiu instruas la germanan lingvon, apud Duden pli kaj pli devas traserĉi la anglajn retvortarojn kaj alproprigi sin la prononcadon de la en la germana lingvo enigitaj anglaj vortoj. En la faklingvoj, inter kiuj la germana turisma faklingvo, svar-

Engels boven alles?

(Angol mindenek felett?, Wirth Gábor in Magyar Nemzet, 20.11.2013; vertaling uit het Hongaars: Marc Vanden Bempt)

Volgens professor Jürgen Trabant van de Jacobs Universiteit in Bremen "verdringt het Engels de grote cultuurtalen".

De ongebreidelde doorbraak van de Engelse taal in het wetenschappelijke, economische en alledaagse leven ziet de professor als het grootste gevaar voor het Frans, het Italiaans en het Duits. In het wetenschappelijke leven was het Engels vroeger in de eerste plaats de taal van de natuurwetenschappen, vandaag publiceren ook de filosofische-wetenschappelijke auteurs liever in het Engels.

Wie de Duitse taal onderwijst, moet naast de Duden altijd meer snuffelen in de Engelse online woordenboeken en zich de uitspraak van de in de Duitse taal binnengehaalde Engelse woorden eigen maken. De vaktalen, waaronder de Duitse toeristische vaktaal krioelen van Engelse woorden. Bepaalde uitdrukkingen in de marketing gebruiken de Duitsers al gewoon niet meer in het Duits, ondanks dat er Duitse uitdrukkingen voor bestaan.

Met de terreinverovering door het Engels verschijnt tegelijk ook een nieuwe tendens: in de EU wordt buiten het Engelse taalgebied in plaats

mas anglaj vortoj. Specifajn esprimojn en la merkatado la germanoj eĉ ne plu uzas en la bermana, kvankam ekzistas por ili germanaj vortoj.

Kun la terenkonkerado de la angla ankaŭ aperas nova tendenco: en la EU ekster la angla lingvejo anstataŭ du nur unu lingvo plu estas instruata, kiu en la granda plimulto de la kazoj estas la anglo. La principo de "plurlingveco" kiun la EU stimulas evidentiĝas pli kaj pli nerealigebla.

Pro la postuloj de la globaliĝo, la Interreto kaj la dungitara merkato la rolo de la angla lingvo ankaŭ estonte restos, ĝi verŝajne eĉ plifortiĝos.
Tiel ĝi okupos kompareblan pozicion inter la lingvoj kiun iam havis la latina.

Pluraj homoj - inter kiuj la politologo Anddrea Chiti Batelli - jam atentigis pri tio ke, pro la daŭre progresanta terenkonkerado de la angla lingvo, la aliaj lingvoj paŝon post paŝo premiĝas fonen kaj malaperas. Ĉar ilia peranto malaperas, tio samtempe signifas la malaperado de la naciaj kulturoj.

Legante la multajn, inter si kelkfoje rekte malaj opinioj, ne malbonas tamen klare vidi ke, ĉu ni tion volas aŭ ne, pro la atendoj kaj postuloj de pli bone pagata ofico necesas koni la anglan almenaŭ je la nivelo B2. Ĉar ni parolas ĉi tie pri "laborlokoj", laborserĉantoj hodiaŭ jam havu fakajn konojn en la "mondolingvo".

van twee al maar één vreemde taal onderwezen, die in de grote meerderheid van de gevallen het Engels is. Het principe van "veeltaligheid" waar de EU op aandringt blijkt steeds minder waar te maken.

Omwille van de vereisten van globalisatie, het Internet en de werknemersmarkt blijft de rol van de Engels taal ook in de toekomst, ze zal waarschijnlijk zelfs sterker worden. Zo gaat ze een vergeijkbare positie innemen tussen de talen als vroeger het Latijn.

Meerdere mensen - waaronder politoloog Andrea Chiti Batelli - wezen er al op, dat omwille van de steeds oprukkende gebiedsverovering van de Engelse taal de andere talen stap voor stap naar de achtergrond gedrukt worden en verdwijnen. Doordat hun drager verdwijnt, betekent dit tegelijk het verdwijnen van de nationale culturen.

Bij het lezen van de vele, onderling soms diametraal tegengestelde meningen, kan het echter geen kwaad duidelijk te zien dat, of we het nu willen of niet, voor de verwachtingen en basisvereisten van een beter betaalde job de kennis van het Engels minstens op B2 niveau nodig is. Vermits we het hier over "werkplaatsen" hebben, moeten de werkzoekenden vandaag al beschikken over vakkennis in de "wereldtaal".

Dit overzicht baseerde een werknemer van het KITEX Taalexamencentrum op de artikels en meningen

Tiun ĉi superrigardon dungito de la KITEX lingvoekzamena centro bazigis sur artikoloj kaj opinioj troveblaj en **www.goethe.de** kaj **egalite.hu**

(rimarko de la tradukinto: tiu ĉi lasta retejo certe vizitindas)

te vinden op **www.goethe.de** en **egalite.hu**

(nota van de vertaler: die laatste webstek is zeker een bezoekje waard).



Algemene vergadering Esperanto 3000 vzw, Leuven - woensdag 23 april 2014

Ĉeestas: Frans Croon (prezidas), Martin Decaluwe, Ivo Schenkel, Helena Van der Steen, Marc Vanden Bempt (raportas)

Frans opent de vergadering.

Er wordt vastgesteld dat het quorum van 50% van de leden niet gehaald wordt. Er wordt dus beslist de dagorde te verplaatsen naar de tweede algemene vergadering die plaatsvindt op woensdag 14 mei 2012.

Hiermee wordt de vergadering van vandaag afgesloten.

* * * * *

2de Algemene vergadering Esperanto 3000 vzw, Leuven - woensdag 14 mei 2014

Ĉeestas: Frans Croon (prezidas), Martin Decaluwe, Roger Goris, Ivo Schenkel, Marc Vanden Bempt (raportas), Helena Van der Steen

Opening

Frans opent de vergadering
(post antaŭplado de Martin, nome superrigardo de kelkaj artikoloj el la aprila kaj maja gazetaro)

Financieel verslag 2013

Helena overloopt alles (en Marc de boekendienst):

De resultatenrekening jaar 2013.

1. We hebben dit jaar een grote winst, omwille van het samenkomen van subsidies over meerdere jaren.
2. Het overzicht van de bank- en andere rekeningen;
3. De balans toont een totaal van eigen middelen van 7.055 €; hier komen nog 5.748 € bij van de boekendienst waaronder 2.123 € nog te verkopen voorraad..
4. De detailinformatie van interne facturen, betalingen, e.d.;
5. Het budget voor 2014 geeft een vooruitzicht op een minimaal negatief eindresultaat.

6. We beslissen voor het Talenfestival 1.000€ meer uitgaven te budgetteren (uitgebreidere reclame), zodat het budget evenveel negatiever uitkomt.

Marc zal aan “estraro” de verantwoording sturen van het kleine bedrag in kas na het Talenfestival. Dit komt door facturen die ter plaatste uit de kas betaald werden (o.a. Boeken Gaston Dorren).

De algemene vergadering keurt unaniem de rekeningen en het budget goed.

Jaaroverzicht activiteiten 2013

Roger deelt een schriftelijk overzicht uit van de activiteiten van het voorbije seizoen 2013-2014.

Er waren weinig voordrachten op de Vesperoj, het publiek is ook beperkt. We zouden graag jongeren zien aansluiten. Dit is zowat de situatie waar we ook in 1993 waren.
Het bestuur is weinig actief, omwille van leeftijd, verhuis buiten Leuven en zo.

Er moet beslist worden of we zo verder gaan, dan wel de activiteit formeel beperken.

Bestuur

Het bestuur krijgt kwijting over de voorbije periode.

Het volgende bestuur wordt verkozen:

- Frans Croon (voorzitter)
- Martin Decaluwe (vice-voorzitter en netbeheerder, Grensstraat 69, 3010 Kessel-Lo)
- Roger Goris (secretaris, R. Menada 44, 1320 Hamme-Mille)
- Ivo Schenkel (kassier, Karekietenlaan 14, 3010 Kessel-Lo), Sandra Schenkel (jeugdwerking, Edelzangerslaan 50 bus 42, 3010 Kessel-Lo)
- Helena Van der Steen (bestuurslid).

Het adres van de vereniging blijft: Karekietenlaan 14, 3010 Kessel-Lo.

De taken van de secretaris worden, zoals vorige keer afgesproken maximaal gespreid over de andere bestuursleden. Roger blijft wel het jaarverslag maken en de lokalen reserveren.

Planning 2014 en verder

Er wordt beslist de activiteiten te heroriënteren in de volgende jaren. Dit gaat in vanaf september e.k.

Zo kan er meer nadruk gelegd worden op het internet: de eigen webstek en facebook en activiteit op andere plaatsen.

De vierde woensdag wordt vrijgegeven, de vervolgcursus verschuift naar de tweede woensdag, onder de hoofding: “Vespero 3000: voordracht- en lesavond.”.
De libroservo wordt afgebouwd (zij het niet tot nul): minimaal aankopen, maximaal verkopen. Marc zal aan Martin een overzicht van de voorraad bezorgen met prijzen, om op de webstek te plaatsen.

Daarnaast zal het volgende Talenfestival, in februari 2015, het laatste uit de reeks zijn. Eventueel kan het door een andere organisatie overgenomen worden. De SIA van 2014 was ook de laatste uit deze reeks.

We blijven wel verder deelnemen aan Zocalo en voor zover mogelijk aan andere activiteiten gericht op de buitenwereld.

De polis verenigingsleven kan eventueel opgezegd worden (vervaldag: 5 februari).

De vergadering werd afgesloten rond 22 uur.

* * * * *

Na de vergadering...

... werd het Talenfestival 2015 in vraag gesteld. Dit zal besproken worden met de directie van het CLT. Nieuws volgt laten.

* * * * *

Lernu!

lernu! is een meertalige website waarmee Internetgebruikers gratis en op een gemakkelijke manier de internationale taal Esperanto kunnen leren.

http://nl.lernu.net/

